

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Jaume Herp

ESPERANTO I RADIOFONIA

La nova emissor de "Ràdio Barcelona"

Atentament invitada la «Kataluna Esperantista Federacio» a assistir el dia 25 de febrer a la inauguració oficial de la nova i potent emissor que «Ràdio Barcelona» ha instal·lat al cim del Tibidabo, hi fou representada pel nostre amic Angel Valdepeñas, soci de la «Asociació Nacional de Ràdiodifusió» i membre de la «Penya Ràdioesperantista».

Felicitem coralment «Ràdio Barcelona» (que tantes amistats compta entre els federats de la K. E. F.) perquè amb el nou esforç realitzat, demostra com és veritat el generós ideal de cultura que anima els seus dirigents, que ja s'evidencià en la antiga emissor en establir-hi conferències i cursos d'Esperanto com es fa en les més importants estacions europees i americanes. (Madrid, París, Roma, Berlin, Leipzig etc. etc.).

L'esperantisme mundial, que té ràdioistes tan eminents com Mr. Mesny, Mr. E. Belin, el Dr. Privat i altres, celebra aquest nou progrés en el moviment radiofònic, i espera amb anhel el festival esperantista que el dia 7 d'abril serà radiat des de la alta antena de «Ràdio Barcelona».

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

*sufix per al
femeni*

heroino, reĝino
katino, leonino

O

*terminació
substantiu*

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

*terminació
adjectiu*

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

*terminació verb
(infinitiu)*

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

*terminació
adverbial*

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

*mode condi-
cional*

U

*mode impera-
tiu o subjun-
tiu*

Mi	skribas	skribis	skribos	skribus	skribu
Jo	escric	escrivi	escriuré	escriuria	escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo escric la carta.

En les altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

Fervoro - Ofero

Nia movado hodiaŭ postulas oferon. Eĉ Movadoj por amuzaj celoj postulas oferon de siaj adeptoj. Ĉu niaj kamaradoj por paco kaj amo, por justeco kaj kompreno ne estos sindonaj? Kelkaj jam plurfoje pravis sian fervoron. Kelkaj el niaj kunfederacianoj tre inde kaj noble respondis la petojn de K. E. F. Ni tamen devas organizi la regimenton de niaj fervoruloj.

Ni devas multe labori kaj, do, bezonas laborulojn: ĉu por informado al ni, ĉu por informado pri nia movado al ĉiuj rondoĵoj en nia teritorio, ĉu por propagando kaj instruado de nia lingvo, ni bezonas kunlaborantojn: venu al ni, proponu vin al ni, oferu laŭ viaj cirkonstancoj, povo kaj kapablo, por antaŭenigi nian karan aferon.

Ni devas pagi por la Konstanta Repraesentantaro, kiu estas necesa kolono, apud U. E. A., por la subteno al la grava funkciado de la Internacia Centra Komitato. Ni devas pagi por eldonado de nia gazeto, necesa organo nia, necesa organo de la Internaciaj Floraj Ludoj, kaj por lernolibroj, kaj por propagandiloj, kaj por monpunoj: ni bezonas monon, tiun materian necesan perilon, kiu estas malinda se ĝi ne estas iel utiligata por noblaj aferoj, kiu estus malbeninda se ĝi nur taŭgus por satigo de egoismaj pasioj. Sendu al ni monon por idealo, por utilo homarama, por esperanto, por homaranismo, por kulturo, por nia sankta afero.

Fervoro estas vera kiam ofero pravas ĝin. Karaj gesamideanoj: estas mil manieroj oferi. Nia movado bezonas ĉies kaj ĉian oferon.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

Konvertiĝo

Ah, mia preĝ' — nur ĝemo, vojon retrovanta:
 nur nana ve' pro memfendita vund' .
 Mi trene tiras jugon de la Tero vanta
 kaj man' de Baal min premas ĝis marĉfund' .
 Jam mankas voj' el nokta blind' al taga lumo.
 Ne hardis koron virtofajra ard' .
 Malfruis la semant' . Senfruktas kora humo.
 Ne greno kreskis, sed sarkinda kard' .

Vespero... Vibro de lanternej lumoj tremas.
 Ŝancele vagas mi sur strata voj' ...
 Sencelo tedas... Pensoj mute rekviemas
 ĉe rubaltaro pri l' entomba ĝoj' ..
 Fantomoj venas: jen knabino el bordelo
 min logas al volupta danca fest' ,
 jen bruas brandhaladza kant' el gastejkelo
 vokanta min al sia ranca nest' .

«For! For! Rifuĝu el ŝlimbuŝo vin glutonta!»
 sed vane krias mi, ĉar mankas vol' .
 Eĉ pentu ne vekigas pro l' pasinto honta;
 blasfemsemaĵo putras sub tavolo' .
 Do kien turni min? Ĉu venos kiu savas?
 Ĉu ŝprucas fonto por la soifant' ?
 Kompato homa estas «manon mano lavas»
 maskita egoismo, pruda kant' .

La strata bril' pupilojn tegas per retino
 kaj kun si rulas vin la lumlavang' .
 Venenas la groŝkosta am' de stratknabino;
 perfidon kaŝas la ŝminkita vang' .
 Atendas tamen mi... Pri kio?... Jen enigmo.
 Ne vokas hejm' , ĝi kuŝas en ruin' .
 Ne gardas la memfid' , pereis jam la digno.
 Frakasís ilin — strato kaj knabin' .

Nun pian psalmon portas la noktmeza, vento:
 «La veston ĵetu for! Ĝin kovras pek' ...»
 La ventflugilo zumas: «Vi, multpekinta gento,
 Kristsango fluas por la kora sek' ...»
 La psalmo ploras kiel la signala tinto,
 vokanta ŝipon el ondomb' al rod' .
 Al mi parolas voke ĝi, al v o j p e r d i n t o :
 «Vin savos la korfunda pentklopod' ...»

Hezite mi ekiras kaj ŝancele paŝas.
 Postsekvas min la Pek' sur kotĉeval'
 Pasint' torturas, nuno korvipante draŝas
 kaj mokas duba rid' de dio Baal.
 Jen domo... Min haltigas lumo, orgenmuĝo...
 Tra l' pordo sonas la kantanta ĥor' .
 Invitas voĉ' virina al ĉiela juĝo:
 «Al pentobenk' vin vokas la Sinjor' !»

«Ah, mia preĝ — nur ĝemo, vojon netrovanta;
 nur nana ve' pro memfendita vund' .
 Mi trene tiras jugon de Tero vanta
 kaj man' de Baal min prenas ĝis marĉfund' , »
 Sed diras ŝi: «Al pentobenko venu, frato!
 Konsolon trovas la pentanta kor'
 kaj levos ĝin eterna grac' de l' Dikompato.
 Ne preteriru! Ne rapidu for!»

«Jam mankas voj' el nokta blind' al taga lumo.
 Vesperto vidas nur en noktmalhel' .
 Malfruis la semant' . Senfrukte kuŝas humo.
 Perdigis inter kardoj ĉiu bel' . »
 Sed diras ŝi: «La pentobenko vin atendas.
 Nun vokas Di' , sed morgaŭ — eble ne...
 La konvertiton la hieraŭ ne turmentas» .
 Mi spitas plu: «Ĉu kredi? Ne! Ne! Ne!»

Nur pluen! La migrant' survoje finas lukton
 kaj falas kiel vermmordita fag' .
 Sunbrila varm' ne dotas la malfruan frukton,
 forskuas vento ĝin dum vintra tag' .
 Moral' jungita estas monstro egoista.
 Kun kotĉevalo vanas la batal' ...
 Do pluen!.., Sed haltigas min vizaĝo Krista
 kun sangaj vundoj kaj postmorta pal' .

«Do kien, filo? Nur ventanimeco en vi spitas.
 Sofistaj pensoj flegas sen kurac' .
 Do lasu for! La voj' de l' Ter' al senvojeco gvidas.
 Despoto nutras sklavojn per minac' .
 Do kien? Kredi timas nur la M a l k u r a ĝ o .
 Eĉ dubi timas ĝi pri sia just' .
 Vi sekvu min kaj brave en agad' kaj saĝo
 reflektu pura lum' de koma brust' .

Foriĝis la aper', sed mi la voĉon konas.
 El infanaĝo plendis unu kord'.
 Al dubfrapita vir' miraklojn' sort' ne donas;
 infanan fidon fermas kripta pord'.
 Mi tamen turnas min... Piedoj sin ekmovas.
 La Disinĵoro frapas ĉe l' anim'
 kaj kvankamforte fidi, kredi, mi ne povas;
 la vorto « e b l e » nun instigas min.

Post mi: elektra gurdo kri-muzikas,
 tintante tentas glasfrapanta bru',
 ebria diboĉul' pri « amliber' » predikas,
 sed mi obstine iras... iras plu.
 Apude la mortintan panjon nun mi vidas...
 Ŝi ploras: « Vin hufbato sortfuror' ».
 kaj el la dom' denove la virin' invitas:
 « Al pentobenk' vin vokas la Sinjor' ! »

Kaj iras mi plenfide... For vi peka vesto!
 La nudan koron portos mi al Krist'.
 Li donu novan veston por la nova festo,
 la kriptan pordon fendis Lia pist',
 Kaj mia preg' — se ĝemo, sed jam vojhavanta:
 aklama dankolarm', trovita Ver'.
 Polviĝis la idol', naniĝis Tero vanta,
 en koro jen: *Konsolo* kaj *Esper'*.

JULIO BAGHY

Premiita en la Xlaj. Internaciaj Floraj Ludoj

Pro... kaj Por...

Inaŭguro de la «Barcelona Esperanto Societo» - okazos la 27an de Marto, en la granda salono de l' Ateneu Enciclopèdic Popular. Plej belaj poezioj el la «Kataluna Antologio» estas deklamotaj de S-roj. Grau, Domènech, Alberich, Capdevila kaj aliaj kompetentaj kamaradoj. Nia konata samideanino Palmira Gastellvi kantas popolajn kanzonojn ankaŭ el nia «Antologio». La fama kompilinto de nia granda verko parolados pri la literatur-recoj de Esperanto. Unuvorte, la nova Esperanto-Societo en nia ĉefurbo, regalos esperantistaron per interesege inaŭguro. — Paroladoj en Esperanto pri literaturaj kaj sciencaj temoj estas organizataj ankaŭ de la Barcelona Esperanto-Societo: D-ro. Marian Solà parolados la 24an de aprilo, en sidejo de l' Ateneu Enciclopèdic; temo: Novaj ideoj pri la imuneco.

Pri Amo

Sinjor' respektiginda, pardonu ĉi paron da pekujoj. Aŭtunaj ventoj blovas hodiaŭ per furiozaj turniĝoj, forpelante polvon kaj malvivajn foliojn, kaj kune kun ili forflugis ankaŭ ĉiuj viaj instruoj.

Ne diru, ho patro, ke viv' estas vanto.

Ĉar ni faris fine interpacon kun la morto kaj almenaŭ por kelkaj bonodoraj horoj ni ambaŭ estas senmortigitaj.

Eĉ se la reĝ-armeo venus kaj kruelege nin atakus, ni ĉagrene kapskuus kaj dirus: Fratoj, vi malhelpas al ni. Se vi bezonas ĉi bruon ludon, iru kaj tintu per viaj armiloj aliloke. Ĉar nur por malmultaj rapidaj momentoj ni estas senmortigitaj.

Se amike popolo venus kaj ronde nin ĉirkaŭus ni humile ilin salutus kaj dirus: tia tro granda feliĉo nin ambarasigas. Da loko estas avare en la senfina ĉielo, kie ni troviĝas. Ĉar printempe floroj aperas amase kaj la agemaj abelflugiloj puŝadas sin reciproke. Nia malgranda ĉielo, kie troviĝas nur ni du senmortuloj, estas ridinde tro malvasta.

Meznokte la kvazaŭa asketo proklamis:

«Jen estas la tempo por forlasi mian hejmon kaj iri serĉi Dion. Ha, kiu tenis min tiel longe ĉi tie en trompo?»

Dio ekmurmuris: «Mi», sed la oreloj de l' homo estis ŝtopitaj.

Kun infano ekdorminta ĉe ŝia brusto kuŝis lia edzino, trankvile dormante en la dua parto de l' lito.

La homo diris: «kiuj vi estas, kiuj min tiel longe senprudentigis?»

La voĉo diris refoje: «Ili estas Dio». Sed li tion ĉi ne aŭdis.

La infano ekkriis en ĝia song' kaj ŝoviĝis pli al sia patrino.

Dio ordonis: «Haltu, stultulo, ne forlasu cian hejmon». Sed tamen li ne aŭdis.

Dio ekĝemis kaj plendis: «Kial iras mia servanto min serĉi, forlasante min?»

Ankoraŭ la tag' ne pasis, la foir' ne finiĝis, la foiro sur la river-bordo.

Mi estis timinta, ke mia tempo estis malŝparita kaj mia lasta penceto elspezita.

Sed ne, mia frato, ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

La vendad' kaj aĉetado finiĝis.

Ĉiuj apartenaĵoj de ambaŭ flankoj estas enkasigitaj kaj estas tempo al mi por iri hejmen.

Sed pordisto, ĉu vi postulas vian imposton?
Ne timu ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

La trankvil' en la vento minacas per uragano, la malaltaj nuboj sur la
okcidento nenion bonan aŭguras.

La silentigita akvo atendas la venton.

Mi rapidas transiri la riveron antaŭ ol la nokto min kaptos.

Ho, pramisto, vi volas vian salajron!

Jes, frato, ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

Sur la vojrande, sub la arbo sidas la almozulo. Ve, li rigardas je mia
vizaĝo kun timema espero.

Li pensas, ke mi estas riĉa pro la taga enspezo.

Jes, frato, ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

La nokto fariĝas malluma kaj la vojo-dezerta. Lampiroj brulas inter la
folioj.

Kiu vi estas, kiu sekvas min per ŝtel-silentaj paŝoj?

Ho, mi scias. Estas via deziro prirabi min de mia tuta perlaboraĵo. Mi
vin ne elrevigos.

Ĉar ankoraŭ ĉe mi io restis. Mia sorto ne trompis min je ĉio.

Je mez-nokto mi atingas hejmon. Miaj manoj estas malplenaj.

Vi atendas min kun maltrankvilaj okuloj ĉe mia pordo, maldormanta
kaj silenta.

Kiel bird' timigita vi flugas sur mian bruston kun pasia amo.

Jes, jes, mia Dio, multa restis ankoraŭ. Mia sorto ne trompis min je
ĉio.

ED. WIESENFIELD

Premiita en la Floraj Ludoj 1925.

Pro... kaj Por...

S-ro. Direktoro de «Kataluna Esperantisto».—La 31an de Januaro okazis
generala kunsido de «Nova Sento», en ĝi estas elektita la jena komitato.
Prez. J. M.^a Gorriz; Vicprez. P. Vives; Sekr. J. Bolós; Vicsekr. A. Ribera;
Kalk. A. Mongay; Kas. S. Vives; Bibliot. E. Gili; Voĉdonantoj: R. Burgada,
P. P. Gorriz, J. Llunell, J. Farràs.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

(daŭrigo)

* * *

La principoj, kiujn ni suprajne trarigardis, estras en Esperanto, kie ili aperas en senĉesa interluktado kaj reciproka influado. La harmonio de la lingvo intime dependas de la ekvilibro de ĉiuj principaj fortoj, kiuj en ĝi funkcias.

En tio kuŝas rimarkinda simileco inter la lingvo kaj la vivulo, kies sano dependas de la ekvilibro de ĉiuj interbatalaj elementoj, kiuj funkcias en ĝia organaro.

Se unu el la elementoj nenormale plifortigas je malprofito por la ceteraj, tiam la vivulo suferas malsane aŭ hipertrofie. Same estus al la lingvo, en kiu kelkaj principoj superregus la ceterajn.

Ni vidu ekzemplojn de la interprincipa lukto. La kultureŭropa principo postulas akcepton de ĉiuj internaciaj elementoj: matr, sestr, duhter, tant, min, mikr, silv, lef, bas, rar, beb, dam, alb, lit, kalm, tempest,... Kontraŭ tio, la aŭtonoma principo penas forigi ĉiujn nenecesajn radikojn, anstataŭeblajn de la kunmetaĵoj: aboco (alfabeto), aerosfero (atmosfera) aeroŝtono (aerolito), belvidejo (belvedero), brakseĝo (fotelo), diismo (teismo), filido (nepo), fratido (nevo), organaro (organismo), evorto (adverbo), kma.

La ekonomia principo konsilas mallongigi laŭeble ĉiujn elementojn: foti (fotografi), kino (kinematografo), aŭto (aŭtomobilo), rio (rivero), sro (sinjoro), frino (fraŭlino), kado (kamarado), koopa (kooperativa), Eo (Esperanto), Ea (Esperanta),... sed la tradicio tion ne permesas.

La fonetika principo, kontraŭ la regulfomeca, volus ke oni skribu: dizdoni, egbati; kabdoloro, ratknaro, kasformo,... (disdoni, ekbati, kapdoloro, radknaro, kazformo).

La aglutineco, kontraŭ la ekonomio, postulus formojn: patrinnjo, pa-trĉjo,... anstataŭ: panjo, paĉjo.

La fonetika principo, kontraŭ la tradicia, volas aliigi la vortojn: ekzemplo, ekzameno, absceso, absoluta, asbesto,... (kiuj estas flue elparolataj kiel egz..., aps..., azb...)

La origina etimologio postulas: abiso, ametiso, umero, hodie, balde, hiere, vipero, geneto, horizons, stof, stono, stupo, svito, acipitro, alĝebro, buĝeto, ĉelulozo,...

ALDONAJ NOTOJ PRI LA PRINCIPOJ

§ 1. Esperanto estis kreita de pola kuracisto Lazaro Zamenhof (Lejzer Zamenov — laŭ la oficiala juda akto pri naskiĝo), naskita en Bialystok 1859. XXII. 15, tiama rusa urbo, kaj mortinta en Varŝava 1917. IV, 14, tiam okupita de la germanoj. Dum dekdu jaroj li laboris super sia projekto, senĉese ĝin provante kaj ŝanĝante, antaŭ ol li decidigis publikigi ĝin per rusa lingvo en la unua lernolibreto, je fino de la 1887.

Ido de la eŭropa kulturo, la kreinto de Esperanto, povis bazi nur sur la kultureŭropaj lingvoj. Sed elekto de tiu bazo havis ne sole personan karakteron, ĝi pravas ankaŭ pro la tutmonda supereco de la eŭropaj kulturlingvoj, kiuj, ekster Eŭropo, vastiĝas en la du Amerikoj, en Afriko, Aŭstralio, Oceanio, Insulindio, Siberio, kc.

La nuna eŭropa kulturo havas siajn radikojn en ĉiuj tri partoj de la Malnova Mondo: en Eŭropo mem, en Azio, kaj en Afriko. Ni ne havas dokumentojn pri la pratempa kulturo de la primitivaj hindeŭropanoj, vidoj, keltoj, kies komuna patrujo estis ie inter Elbo kaj Volgo. Sed ni scias pri la posta kultura evoluo — de Skandia landaro norde kaj de la Mezmarasude. Tiu lasta kulturo heredis de la Hindoj, Persoj, Asiroj, Babilonanoj, Siroj, Fenicoj, Hebreoj, Frigoj, Galatoj, Pelasgoj, Etruskoj, Lelegoj, Kretanoj, Iliroj, Trakoj, Skitoj, Kartagoj, Epigtanoj, Araboj. Tiel okazis ke la nunaj eŭropaj kulturlingvoj alprenis multajn radikojn de la aziaj kaj afrikaj nacioj. En nova tempo ili alprenis iom de la amerikaj, oceaniaj kaj orientaziaj popoloj.

§ 2. Per nombro de esperantistoj, loĝantaj en Eŭropo ($\frac{9}{10}$) kaj parolantaj en eŭropaj lingvoj ($\frac{99}{100}$), Esperanto nun travivas ankoraŭ eŭropan periodon de sia evoluo; tio klare videblas en ĝia literaturo, eĉ en la vortaroj. Ekzemple la «Universala Vortaro» kaj ĝiaj tri oficialaj Aldonoj entenas nur kvar nomojn de la sanktaj skriboj: Biblio, Evangelio, Korano, Talmudo. Sed tie mankas ne malpli gravaj por la homaro: Vedo, Zendavesto, Tripitako, Manuleĝo, la sanktaj libroj de bramanoj, budhanoj, kc. Ankaŭ la vortoj kiuj rilatas je bestoj, plantoj, vestoj, ilo, troveblaj en la samaj vortaroj, havas plejparte nur kultureŭropan karakteron.

§ 3. En antaŭa § ni vidis ke Esperanto prezentas plejparte eŭropan kulturon. Ankaŭ ĝia «sankta libro», la Fundamento, estas verkita nacilingve, nur por francoj, angloj, germanoj, rusoj, poloj. Nun, kiam en Esperanta movado partoprenas ankaŭ italoj, hispanoj, finnoj, estonoj, latvoj, lietuvo, maĝaroj, ĉeĥoj, horvatoj, bulgarioj, serboj, kc. eŭropanoj, la limigita nacieco de la Fundamento prezentas baron al la lingva unueco. Tiu baro, kun la kreskanta ekstereŭropa tutmondeco de Esperanto, ĉiam pliiĝas. Post la 1909-10, kiam aperis Esperanto-Esperantaj vortaroj de Boirac kaj de Kabe, jam neniu dubas pri tio, ke sole la internacia Fundamento, t. e. nuresperante verkita, povas servi kiel vera lingva bazo egala por ĉiuj nacioj kaj gentoj. Eĉ por la nomitaj kvin nacioj la nuna Fundamento ne estas egala

bazo, ĉar ekzistas gravaj diferencoj inter la naciaj tradukoj de l' samaj Esperantaj radikoj. Ĉar, pro la naturo mem de la naciaj lingvoj, ne estas eble ĝuste traduki vortojn de unu nacio per vortoj de la alia, tial ĉiu provo difini Esperantan radikaron per samtempa plurnacia radikaro estas antaŭe kondamnita al malsukceso.

Male, se estonta, internacie verkita, Fundamento enhavos erarojn aŭ malklaraĵojn, pro tio ne suferos la unueco de Esperanto, ĉar tiuj eraroj kaj malklaraĵoj ekzistos egalaj por ĉiuj nacioj. En ekstrema okazo estus preferinda uzo de unu nacia lingvo, ol de la pluraj inter si neniel akordeblaj. En la estonta Fundamento povus esti larĝe uzataj la bildoj, desegnoj, teknikaj signoj, formuloj, kaj la latinsciencia terminaro, altgrade preciza kaj unuforma.

§ 4. Aŭtonomeco por Esperanto signifas la sendependan ekziston super la naciaj lingvoj, ne la konkuradon kontraŭ ili en pure naciaj medioj. Nia lingvo celas esti amika helpanto de ĉiuj nacioj kaj gento, sed ne la malamiko. La homaro fariĝus mizera, se anstataŭ multekolora naciaro ĝi estus unuforma landanaro, ĉar diversaj naciaj kulturoj kaj psikoj malfermas diversajn pordojn por la spiritoj, prezentas malsamajn vojojn por la intelektoj.

§ 5. Tendenco al la plifacilaĵoj en nia lingvo, laŭ la ĝisnuna kreskado, montris sin en tri direktoj. Unue, oni penas anstataŭigi tro longajn vortojn per la mallongaĵoj (varo, nano, foto, kino, aŭto, kado, dro, sro, UEA, LK, CK, KR, Eo, Ea, Eisto, ktp.). Poste, oni ŝatas regulajn formojn pli ol la neregulajn (finaĵo, virhundo, jarcento, gimnasto, mekanisto, restorejo, observejo, aliu, kelkiu,...). Tria, oni preferas pli simplajn kunmetaĵojn (belo, libero, virgino, limita, kolorita, ree, ene, iĝi, ema, ano, ismo,...). Nuntempe iu japano aŭ ĉino bezonas 2 jarojn por ellerni Esperanton, kaj 10 jarojn por ellerni la francan, anglan aŭ germanan.

§ 6. Kiel ĉiu nacia lingvo, tiel ankaŭ Esperanto prezentas variojn de la sonoj, individuajn kaj lokajn, kiuj tamen ne malhelpas la buŝan interkomprenon, ĉar ili ete diferencas de la meza elparolo. Konata franca lingvisto, s-ro Meillet, ie skribis, ke ne ekzistas en Parizo du denaskaj parizanoj kiuj tute egale elparolas sian hejman langaĵon. Des pli estas pardoneblaj la malsamaĵoj en la buŝoj de diversnaciaj esperantistoj. La tradicia meza elparolo de Esperanto originas de la lingvaŭtoro mem, kaj nun ĝi estas senrompe disvastata, kaj gardata per la persona tradicio. Ĝi krome estis plurfoje fiksita sur gramofondiskoj, kaj fonetike difinita en la naciaj lernolibroj. Fine, post la milito, la radiotelefono multe kontribuas al la tutmonda unuformiĝo de la modela elparolo.

En Esperanto ekzistas 28 normaj sonoj, al kiuj aldoniĝas la aliaj, tro multaj kaj delikataj por ke oni ilin ĉiujn registru. El ili nur la ĉefaj estas ĉi tie notindaj: 5 nazaj vokaloj, palata n, 2 konsonantaj j, ŭ, kaj okluziva dz. Ekzistas do entute 37 ĉefaj sonoj.

La konsonantoj estas: 10 okluzivaj, 10 frikativaj, 3 razaj, 2 likvaj. La okluzivaj estas:

k	p	t	c	ĉ
g	b	d	dz	ĝ

Oni nomas ilin ankaŭ alimaniere: kg malantaŭlangaj, pb dulipaj, t d dentolangaj, la ceteraj kvar - siblaj, aŭ kunmetitaj (ts dz tŝ dj). La frikativaj estas:

f	ĥ	j	s	ŝ
v	h	ĵ	z	ĵ

Oni nomas ilin ankaŭ alimaniere: fv lipodentaj, szŝj antaŭlangaj, ĥ malantaŭlanga, h laringa, j mezlanga, ŭ dulipa. La nazaj estas:

m	n	nj
---	---	----

m dulipa, n dentolanga, nj palata aŭ mola. La lasta ekzistas en la franca (gn), portugala (rh), en la hispana, pola, ĉeĥa (n supersignita), en la rusa, serba, ĥorvata, k. a. La likvaj estas:

l	r
---	---

l flanka-antaŭlanga, r rula antaŭlanga. Kartava r, simila je ĥ, ne havas en Esperanto memstaran rolon, estante nur individua vario de rula r.

La vokaloj estas 5 normalaj kaj 5 nazaj. La normalaj, orditaj laŭ la tonalto, estas:

u	o	a	e	i
---	---	---	---	---

La nazaj aŭdeblas en jenaj ekzemplaj vortoj:

fungo	longo	rango	venĝo	ringo
-------	-------	-------	-------	-------

kie un-on-an-en-in signas la nazajn vokalojn. Normalaj vokaloj sonas same kiel en la itala, serba, ĥorvata. La nazaj estas parte konataj en la franca, pola, ĉina, manĝura, rusa, macedoslava, k. a.

La duonvokalaj j, ŭ, ekzemplas en vortoj: *kaj, ajn, laŭ, aŭdo*. La samaj literoj, starante en la komenco, signas la konsonantojn, ekz. *ja, je, juna, ŭo, ŭato*.

Alisonado estas fiziologie natura fenomeno, kiu konsistas en aliĝo de la sonoj pro reciproka influo. Ekz. n sonas normale en vorto *melono*, ĝi naze sonas en vortoj *melonkampo, melongusto, melonĉapelo*. K normale sonas en *ekaŭdi*, ĝi sonas kiel g en *ekbati*. N sonas normale en *pano*, kaj palate en *panjo*. Kaŭzo del alisonado kuŝas en interadaptiĝo de la sonoj, kiuj en flua parolo formas unu tuton. Por kuufandiĝi la sonoj ofte bezonas iom ŝanĝi sian nuancon, iufoje eĉ multe aliĝi; tiel aperas la alisonado.

La lingvaŭtoro konis la alisonadon, kaj menciis ĝin ne nomante per speciala termino. «Kiel en ĉiuj lingvoj, tiel ankaŭ en Esperanto la sono j ordinare moligas la konsonanton, kiu staras antaŭ ĝi; oni sekve ne devas miri, ke ekzemple en la vorto panjo la plimulto de la esperantistoj elparolas la nj kiel unu molan sonon (simile al la franca gn). Tiel same oni ne miru, ke en praktiko oni ordinare antaŭ g aŭ k elparolas la sonon n naze.. (Zamenhof en Of. Gaz. 1911, p. 222).

La alisonado analogas je la kolora interinfluo, konata en optiko kaj pentrarto. Ekzemple la blanka makulo, metita apud la verda, ŝajnas esti bluroza aŭ lila. En in pentraĵo la koloraj formoj prezentas unu harmonian tuton kaj ŝajnas nuancitaj alispece ol kiam ili estas rigardataj izole. Alia ekzemplo: en rapida maneskribado oni nevole kaj devige ŝanĝas la modelajn formojn de la izolaj literoj, kiam ili estas ligataj laŭvice por konstitui la tutajn vortojn.

La alisonado aperas kiam surda konsonanto antaŭas la sonorajn, aŭ la sonora antaŭas la surdan.

En suba tableto sub ĉiu sonora konsonanto staras ĝia surda korespondanto.

b	dz	d	v	g	h	ĵ	z	ĝ	sonoraj
p	c	t	f	k	ĥ	ŝ	s	ĉ	surdaj

Sonora konsonanto povas ligiĝi nur kun la sonora, surda konsonanto kun la surda. En malaj okazoj aperas alisonado tiamaniere ke la antaŭa konsonanto adaptiĝas al la sekvonta: *kapdoloro* (bd), *ladkesto* (tk), *lavtuko* (ft), *disdoni* (zd), k. s.

P. STOJAN L. K.

(daŭrigota)

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Al Fraŭlino Caterina Montaner

Reĝino de la Internaciaj Floraj Ludoj
en Palma de Mallorca

Se vi estis Reĝin' «de unu tago»
ĉe l' Floraj Ludoj prezidante nin,
vi tamen ĉiam restas en l' imago
de ĉiuj kun admir' vidintaj vin.

Via figuro sub la verda flago,
dum la solena festi', brilos sen fini'
por tiuj kiuj kisis -- dolĉa ago --
viajn manojn majestajn de reĝin'.

Ne mortos la memor' pri tiu festo
kie hele radiis en kunesto
poezio kaj am' : eterna bel'.

Ke de tiuj momentoj l' emocio
eterniĝu ĉe vi, kaj Poezio
ĉiam brilu por vi kun sama hel' !

JAUME GRAU CASAS



XIII.^a Kongreso de K. E. F.

Santa Coloma de Farnés 23-25 Majo 1926.^a

XII^{aj} Floraj Ludoj

LISTO DE VERKOJ RICEVITAJ

(fino)

136. Qu'ien am la plus de bon aire, del mon mais que nulla re... — 137. Ne eble. — 138. La verko de l' majstro. — 139. Elefanto. — 140. Unueco donas forton. —

Sóller, Vendrell, Rubí, Sabadell, Lleyda, Mataró...? Kiu urbo en nia lando atingos la gloron esti la scenejo de la Floraj Ludoj kaj Kongreso de K. E. F. en 1927? Samideanoj kiuj amas sian urbon kaj Esperanton pretiĝu por peto kaj akcepto de niaj solenaĵoj en 1927.

Tri novaj aferoj estas nepre priŭraktotaj en nia proksima Kongreso en Santa Coloma: 1a Ja reguligo de Institucio por Floraj Ludoj, kiuj atingis en Esperantujo tian gravecon, ke ili decas konsisti regulan Institucion. 2a, Oficialigo de Eldona Komitato por servado pri, por kaj per Esperanto en la Radio- Stacioj de nia teritorio. — La florldudanoj, la verkistoj kaj la radiamataroj de nia Federacio estas petataj pretigi por orientigo kaj organizo de tiuj tri gravaj aferoj.

La granda Poeto Joan Alcover

Nia Majstro el Majorco por la katalunlingva elegio. Li ordinare loĝis kaj profesie laboris plej honeste en sia kaj nia kara Baleara Insulo de Romon Llull kaj grandaj poetoj, — mortis korpe antaŭ kelkaj semajnoj, kaj eniris en la senmortecon por la kataluna literaturo. Jen biografiaj notoj el nia «Kataluna Antologio»:

Joan Alcover naskiĝis en Palma de Mallorca (Balearaj Insuloj). Li studis Jurosciencon en la Barcelona Universitato. Poste li reiris en sian urbon, kie li agis kiel advokato kaj deputito Provinca kaj Parlamenta. Malfrue li aperis en la kataluna poezio, sed baldaŭ lia nomo fariĝis tre konata. Nun li estas akceptata de ĉiuj kiel unu el la plej bonaj katalunaj poetoj. Li havas klasikan guston kaj produktis kelkajn perfektajn juvelojn. Li verkis ankaŭ tre interesajn literaturajn studojn.



Pro... kaj Por...

Tutmonda Literaturo, la por Esperanto granda entrepreno de la firmo Mosse en Berlin, estas definitiva kaj sukcesa. Pli ol mil abonintoj jam pagis. Baldaŭ aperos la unua volumo. Niaj amikoj ne forgesu aboni. Abonilojn kaj priskribon petu: «Tutmonda Literaturo» — Dro. Ernest Kliemke, Firmo Mosse, Schützenstr, 24 Berlin S. W. 68. Germanujo.

Tre grava por la Esperanto-movado estas la kunlaboro de *fak-entnultuloj!* Tia altranga eminentulo estas en Wien la landlerneja inspektoro Hofrat D-ro *Franz Wollmann*, la direktoro de la ŝtata Esperanto-ekzamena komisiono. Per la ekfunkciado de tiu ĉi komisiono estas ankaŭ vekita la intereso de la mezlernejaj profesoroj. Pro tio la ĉefredaktoro de la fakgazeto "Der Mittelschullehrer" (organo de la „deviga unuiĝo de la aŭstria mezlernejaj instruistoj") ricevis multajn demandojn de mezlernejaj profesoroj kaj petis s-ron D-ron Wollmann, ke li skribu artikolon. D-ro Wollmann plenumis la peton kaj skribis longan kaj bonegan artikolon por la nomita fakgazeto. Tiu propagandlaboro de la plej altranga landlerneja inspektoro de Wien, kiu estas aktiva profesoro kaj landlerneja inspektoro por *modernaj* lingvoj, tre utilas al la Esperanto-movado, multe pli ol sennombraj paŝoj de privataj personoj. Ankoraŭ pli! Tiu ĉi landlerneja inspektoro eĉ mem gvidas Esperanto-kurson por instruistoj (preskaŭ 60 geinstruistoj)!—André Baudet, nia eminenta franca samideano, Viceprezidanto de la Komerca Ĉambro en Paris, mirige rimarkigas ankaŭ kiel paca batalanto por nia afero: en la grava «Index des Industries du cuir» (54 rue de Bondy, Paris) aperis granda artikolo de li subskribita pri Esperanto, kaj resumo aŭ klarigoj en nia internacia lingvo. — D-ro. R. Torres i Carreres, nia eminenta kataluna radiologiisto aperigis sciencan gravan artikolon kun resumo en Esperanto en la «Revista de Diagnóstico» (Dro. Josep Cusi, Rambla Catalunya, 29, Barcelona), kaj aldonigis noton kun deklaro ke ĉar esperanto estas praktika kaj neŭtrale internacia lingvo, de nun li nur verkos pri scienco en kataluna lingvo kaj en esperanto. — Jen efika agado, jen efektiva progreso de Esperanto en sciencaj rondoj.

La Barcelona Muzikeldonejo «Iberia Musical» eldonis du kanzonojn por kanto kaj piano, de la kataluna komponisto Armand Fluvià, kun la originalaj vortoj de la kataluna poeto Josep Maria Lòpez-Picó kaj esperanta traduko de Jaume Grau Casas.

La kanzono «Tinc enveja del mati» (Mi envias je l' maten') kostas 2 pesetojn; la kanzono «Vostre riure» (Via rido) kostas 1'50 pesetojn.

La konata muzikeldonejo intencas eldoni ankoraŭ pli da katalunaj kantoj kun esperanta traduko, dank' al la influo de nia samideanino F-ino Palmira Castellví, muzika instruistino kaj ĉarma kantantino.

Radio-statistiko. — Por certigi akuratan statistikon ni tre petas, ke tiuj samideanoj, kiuj ankoraŭ ne resendis nian demandaron, bonvolu tion fari tuj por ne malhelpi la bonan funkcion de nia laboro. — *Dokumentoj pri Esperanto.* — Por ebligi kompilon de taŭga propaganda materialo ni petas informi nin pri ĉiuj oficialaj rekonoj, dekretoj, rekomendoj, subtenoj de Esperanto en kiu ajn sfero kaj havigi al ni ĉiufoje la originaltekston (en la koncerna lingvo) kun ĉiuj referencoj, mencioj ktp. kun akurata traduko en Esperanto. Tiu peto direktiĝas ĉefe al tiuj samideanoj, kiuj sin okupis pri la koncerna afero kaj ne rilatis kun ni. Ni samtempe ripetas la peton informi

pri tiaj delatoj la respektivan landan societeton kaj la fakorganizon, se temas pri aparta fak afero. — *Rondvojaĝo de s-ro Ĉe, sekr. de I. C. K.* — Laŭ lia peto, ICK konsentis al s-ro Ĉe libremtempon de tri monatoj kun kora danko por lia sukcesa, sed lacia vojaĝado. Novaj vojaĝoj estas projektitaj por printempo kaj aŭtuno venontaj. Interesatoj bonvolu jam nun interrilati kun siaj asocioj, federacioj, ligoj kaj karteloj por starigo de provizora plano. — *Gazeta statistiko.* — La gazetaraĵn servojn en la diversaj landoj ni petas afable sendi al ni siajn monatajn ciferojn por ebligi korektan statistikon. Anoj de landoj sen gazetara servo bonvolu daŭrigi la sendon de eltranĉaĵoj al nia adreso. Por ŝpari sendkostojn ni ne konfirmas ilian alvenon.

Ĝis finigo de tiu statistiko alvenis por monato januaro artikoloj en la sekvantaj lingvoj: angla 27, franca 25, germana 14, hispana 2, hungara 14, itala 6, kataluna 3, kroata 1, litova 1, latva 3, pola 3, rumana 1, rusa 1, sveda 2. — *Korespondantoj.* — Kun plezuro ni ricevos adresojn aŭ aliĝojn de samideanoj, kiuj per jara pago de 100 sv. fk. deziras fariĝi korespondantoj de nia komitato. — *ROB. KREUZ.* Ĝen. Sekr. de Internacia Centra Komitato: 12 Bd. du Théâtre. — Genève (Suisŝa).

Pro la nova organizo de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (T. E. K. A.) kaj pro la plibonigo de la Internacia Medicina Revuo; Doktore Bartomeu, el Barcelono (Tallers, 11. Apoteko) kiu estas ĝia reprezentanto por Hispanujo, nun ricevas multajn aliĝilojn el diversaj hispanaj urboj sed estas citinda tiu de S-ro. J. G. Armendaritz-ĉefdirektoro de la veterinaraj servoj de la sanstato je Madrido ĉar li estas tute kuraĝa kaj fervora al Esperanto, kiel ankaŭ D-ro. Gómez Aguado (Córdoba) direktoro de la revuo «Por la Infancia».

Grava Esperanto-festo ĉe «Radio Barcelona» (325 m.). — Okazos la 7an de aprilo, nokte, de 9 ĝis 11 h. — Paroladoj, i. a. de D-ro. Bartomeu kaj profesoro S-ro. Domènech. Deklamo de zorge elektitaj poeziaĵoj. Eminentanta kantistino samideanino Palmira Castellví, regalaos nin per belaj kantoj esperantaj. Disaŭdigo de gramofon-cilindroj per kiuj emocio, oni aŭdos niajn neforgeseblajn Zamenhof, Bourlet, kaj aliajn. Ankaŭ oni ludos belan muzikaĵojn. Radio-esperantistoj! Samideanoj el tutmondo! Aŭskultu, kaj sendu gratulan poŝtkarton al: Radio Barcelona, Casp, 12, primer. Barcelona.

Nekrologo

Nia estimata samideano Jacint Comella en Vich, havis la malfeliĉon senhaviĝi de sia bopatrino Teresa Molas i Castells. Bonvolu nia kara amiko kaj lia edzino akcepti la sinceran esprimon de nia kondolenco pro tiu dolora fakto.

Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevatajn)

ORGANIZA STATUTARO. — Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, Genève, 12 Boulevard, du Théâtre. 1925. 31 paĝoj, 17 × 12. Sen-paga por la Naciaj Societoj.

Ĝi enhavas: 1. Kontrakto de Helsinki. 11. Regularo de la Kongresoj. 111. Regularo de K. R. IV. Statuto de U. E. A.

Kiu interesiĝas pri la organiza demando, legu tiun ĉi libreton.

INFORMILO POR JUNAJ ESPERANTISTOJ. — 48 paĝa broŝureto, 12½ × 9. Eldonis Esperantista Junularo, A. Neupert, Leipzig-Möckern, Wedellstrasse 17. (Germanujo). Prezo: 1 respondkupon.

Regularo de Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara, notoj pri ĝia historio kaj organizo, fundamenta gramatiko de Esperanto kaj aliaj interesaj detaloj pri la esperanto-organizo.

DEKSEPA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. — (Genève, 2-7 aŭgusto 1925) Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado: 12 Boulevard du Théâtre. Genève 1925. 48 paĝoj, 25 × 16½. Prezo: 1'25 sv. fr.

Protokolo, Financa Raporto, Statistikoj kaj Raporto de la oficialaj institucioj al la XVII Universala Kongreso de Esperanto.

Tre interesa volumeto, lerte redaktita kaj zorge presita. Ĉiu esperantisto akiru tiun dokumentaron por bone konatiĝi kun la disvolvigado de niaj oficialaj institucioj kaj por ĝuste informiĝi pri la progreso de nia tutmonda organizo.

R. U. R. ROSSUM'S UNIVERSAL ROBOTS de Karel Čapek. Kolektiva dramo je enkonduka komedio kaj tri aktoj. Esperantigita el ĉeĥa lingvo kaj eldonita de Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc, 1926. 190 paĝoj, 21 × 15. Mendebila ĉe Ant. Kudela, Olomouc, Novosady. Prezo: 2 sv. fr.

Scienco kaj tekniko sukcesis krei robotojn, t. e. artefaritajn homojn, kies vivo povas daŭri 20 jarojn proksimume. La uzino fabrikas milojn da robotoj. Roboto ne sentas amon, ĝi estas simple maŝino. Fine robotoj ribelas kaj deklaras la homon malamiko kaj senrajtulo en la universo. La ribelo sukcesas kaj la homaro pereas sed, jen la grava problemo, la manuskripto de Rossum estis forbruligita kaj nepre la robota raso pereos post kelkaj jaroj; ili ne kapablas fabriki robotojn. Feliĉe, unu el la doktoroj en la uzino en siaj eksperimentoj fabrikis robotojn kun ĉiuj sentoj. Tiuj ĉi rekreos la homaron; roboto kaj robotino en lasta akto eksentas la ekfloron de amo, kiu savos la homaron de neevitebla pereco.

La aŭtoro de la utopiaĵo pravas sian lertecon per la viveco, kiun li donas al ĉiu rolulo. Diversfoje li sukcesas reteni la atenton de la publiko en duonekstaza stato.

Se oni prezentus la dramon al nia kataluna publiko, ŝajnas al mi, ke ĝi ne trovus grandan sukceson. La utopio estas tiel granda, ke ŝajne la belaj ideoj kaj pensoj montrataj de Helena estus ne atentataj. Oni vidus nur la fantazian flankon.

Bele presita, ĝuste tradukita, la nova akiro estas de ĉiu flanko laŭdinda. Eble kelkaj neologismoj estus forigindaj. «Morta» anstataŭ «morfinta» estas diversfoje uzata. — SALJO.

Esperanto, lingvo de Radio

Ĉiuj niaj legantoj certe konscias pri la graveco de la nuna propagando de Esperanto ĉe radiistoj. Necese estas, ke ni esperantistigu multajn radiistojn kaj, por tio, ke ni igu por ili Esperanton utila. Ankaŭ, ni devas radiistigi kiel eble plej multajn Esperantistojn, montrante al ili, kiel facile kaj interese estas konstrui mem radio-ricevilon, por ke multaj el niaj samideanoj aŭskultu la sendojn de la radio-stacioj kaj povu instigi ilin al uzado de Esperanto aŭ gratuli ilin pro ĝia uzado.

Tial ni kun ĝojo salutas la aperon de la unua numero de «*Internacia Radio Revuo*», monata organo de «*Internacia Radio-Asocio*». Dank' al ĝi Esperanto utilos ne nur al nunaj Esperantistoj, kiuj trovos en ĝi ĉiajn konsilojn necesajn, por konstrui mem malkare radio-aparatojn, sed ankaŭ al radiistoj ankoraŭ ne esperantistoj, kiuj legos en ĝi internaciajn informojn alie ne haveblajn, se nur ili konsentos dediĉi tre malgrandan penon al ioma lernado de Esperanto.

«*Internacia Radio Revuo*» ja celas kontentigi jenajn kategoriojn de legantoj:

1-e Esperantistojn, kiuj interesiĝas pri Radio, pri uzado de Esperanto en Radio, kiuj volas propagandi Esperanton inter radiistoj aŭ deziras fariĝi radio-amatoroj;

2-e Komencantajn radio-amatorojn, bezonantajn sisteman gvidadon en ilia laboro, emajn ekzonojn la teorion, la «misterojn» de Radio, solvi multajn dubindajn problemojn, kiujn ili renkontas dum sia laboro;

3-e Spertajn radio-amatorojn, kiuj volas trovi la kronikon de la tutmonda radio-movado, analizojn de plej interesaj artikoloj el la tutmonda radio-literaturo, lastajn novaĵojn kaj inventojn.

La unua numero entenas interalie originalan artikolon pri propagiĝo de la elektro-magnetaj ondoj, verkitan de nia fama malnova samideano, profesoro Mesny; konsilojn pri diversaj metodoj por instalado de antenoj; detalan priskribon de malmultekosta facile konstruebla ricevaparato; unuan artikolon el teoriaj babiladoj «Paŝo post paŝo»; humoran felietonon «Zoologia studo pri la radio-amatoro»; artikolojn de la ĉefredaktoro D-ro P. Corret, pri la propagando de Esperanto ĉe radiistoj kaj pri la Esperanta teknika radio-vortaro; detalan kronikon de la radiista kaj radi-esperantista movado, k. t. p. Bela kovrilo kaj multenombraj ilustraĵoj certe ne malplaĉos al la legantoj.

La unua numero estos *senpage* sendata al ĉiu esperantisto, kiu mendos ĝin de la eldonisto, sendante samtempe, por la sendelspezoj, unu internacian respondkuponon (por Francujo unu 30-centiman poŝtmarkon). Nepre mendu ĝin, ĉar dank' al ĝi vi povos tre malmultekoste konstrui vian propran aparaton.

La abonprezo por unu jaro estas nur duon-dolaro. Via esperantista devo estas aboni, por subteni la tiel gravan propagandon de Esperanto ĉe radiistoj, samtempe havigante al vi tre interesan kaj fruktodonan legaĵon.

La abonmendojn sendu laŭ adreso: «*Internacia Radio Revuo*», E. Chiron, eldonisto, 40, rue de Seine, Paris - 6.^e

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto», València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

Ĉu vi deziras aliĝi al “Universala Esperanto - Asocio”, “Kataluna Esperantista Federacio”, Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara”, aŭ aboni al “Esperanto”, “Kataluna Esperantisto”, “Literatura Mondo”, “Heroldo de Esperanto”, kaj “Esperantista Junularo?” Petu tuj detalojn al Ferdinando Montserrat, str. Villarroel, 107, 2. - 2.^a, Barcelona. — Ankaŭ li peros pri ĉiuj esperantaj libroj naciaj kaj fremdaj, steloj k. t. p.

TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO per poŝtmarkoj, ni sendas sortimenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA
KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA